

William Blake,
La Sekreto de Amo
tradukita de Clarence Bicknell

Ne esprimu vian amon;
Amo estas nedirebla;
La venteto dolĉe spiras
En silento nevidebla.

Mian amon mi esprimis;
Ĉion el la koro diris;
Ŝi, malvarma kaj tremanta,
Kun timego tuj foriris.

Baldaŭ post foriro ŝia,
Vojaĝanto tien venis;
Nevidebla kaj silenta,
Per ekĝem' li ŝin forprenis.

*Traduko de la Angla poemo "Love's secret" de WILLIAM BLAKE (*1757-11-28 – †1827-08-12) en Esperanton de Clarence Bicknell.*

Arg-1047-2124 (2014-06-08 19:12:24)

Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell.